



# ESPERANTISTA

REVUO POR ESPERANTO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Eldonas Esperanto-Asocio en ĈSR, Praha II, Malá Štěpánská 7. — Redaktas Dr Stan. Kamarýt.

*Ĉe okazo de 70-a naskiĝtago de generalisimo Stalin ni kune kun ĉiuj progresemaj homoj de la mondo salutas lin kiel liberiginton de nia patrujo, kiel gvidanton sur vojo al socialismo, kiel aŭtoron de teorjo pri necesa suvereneco de malgrandaj nacioj, kiel iniciatinton de multaj faroj ekonomiaj kaj precipe kiel garantianton de la paco.*

*Centra Komitato de Esperanto-Asocio en Ĉeĥoslovaka Respubliko.*

*Adolf Malik,*  
*prezidanto.*

*Jar. Mařík,*  
*ĝen. sekretario.*

## Sudme podle faktů

Rektor Masarykovy university prof. Dr Fr. Trávníček ve své úvaze v Lid. Novinách (2. X.) vystavuje již po druhé ostré negativní kritice racionálně utvořený pomocný jazyk povšechně a esperanto jmenovitě.

Opřen o svoji vědeckou autoritu jazykozpytce a vynikajícího znalce českého jazyka, přechází všechny závažné argumenty pro esperanto uvedené v četných odpovědích na svůj první článek z 10. XI. 1946 mlčením a snaží se vyvrátit možnost úspěšné existence racionálně utvořeného mezinárodního jazyka analýsou společenské funkce jazyka vůbec.

A tu na jedné straně správně konstatuje, že jazyk je jevem specificky společenským, více či méně vědomým výtvozem lidské společnosti a je závislý především na rozvoji výrobních prostředků této společnosti, což je s hlediska dialektického materialismu zjištění naprosto správné. I my esperantisté ze stejného pojetí odmítáme, aby se hovořilo o jazyku „přirozeném“ v jakémsi biologickém smyslu a jako naprostém protikladu jazyka racionálně utvořeného z prvků aposteriorních. Tvrdíme, že jazyk je víceméně vědomým výtvozem lidské společnosti, mimo ni žádný jazyk neexistuje a existovat nemůže. Shodně s jazykovědou zjišťujeme, že všechny vyspělé spisovné jazyky byly vystaveny vědomým zásahům a jsou do určité míry útvarem „umělým“, chceme-li již použití tohoto profanovaného výrazu. Až sem se shodujeme s názorem prof. Trávníčka a některých jiných jazykovědců. Zde však my esperantisté setrváváme dále souhlasně s dialektickým pojetím při této koncepci a tvrdíme, že z prvků existujících jazyků kriticky vybraných lze vytvořit racionelní, logický a snadný jazyk a tento ukázněnou mezinárodní spoluprací dovésti k zdárné funkci a k přirozenému vývoji. Můžeme-li zasahovat i do dění biologických (viz Lysenko-Mičurin), můžeme rozumově uspořádat i výtvor tak nesporně lidský, jakým je naše řeč.

Z dalších argumentů prof. Trávníčka pak jasně vidíme, jak někteří jazykozpytci se dopouštějí základního omylu, že kritizují esperanto (a to dokonce tak kategoricky zamítavě, že předem odmítají vedle známých i všechny v budoucnu možné důvody pro mezinárodní jazyk), aniž by je v jeho dnešní formě podrobili zevrubnému vědeckému studiu. Neboť tu by museli zjistit, že esperanto jako jediný vskutku žijící, fungující a rozšířený pomocný mezinárodní jazyk si již dávno svoji svébytnou jazykovou pospolitost vytvořilo. Zjistili by seznáním esperantistů z nejrůznějších národů, neb účasti na jejich konferencích a sjezdech, že neexistuje podstatného rozdílu ve vyjadřování, ve výslovnosti, že tento snadný a logický jazyk je i výrazově bohatý a do subtilnosti přesný, že má svoji tradici, že si vytvořil svůj vlastní logický, jakýsi mezinárodní idiom. Že má svoji pozoruhodnou literaturu včetně poesie, že se velmi obohatil za dobu 60 let, že se vyvíjí dále podle pravidel platných pro ostatní živé jazyky. Že má svoji jazykovou akademii, v níž jsou nejlepší znalci jazyka, básníci i filologové, která dbá o správný vývoj jazyka. Že v Plena Vortaro má významy slov i event. homonymy a obrazné významy přesně vyloženy a normovány s ukázkami použití, takže padá námitka, že i mezinárodní slova mají často v různých jazycích odlišné významy a mohla by být i v esperantu odchylně vykládána; že snadná a pravidelná gramatika je v analytickém 500stránkovém díle Plena Gramatiko do podrobností precizována.

Námitku, že dnešní skutečná jazyková pospolitost světové obce esperantistů, vždy hojnějším vzájemným stykem mezinárodním, literaturou, časopisy a dčpisováním stále více utužovaná, při zavedení esperanta ve světovém měřítku by se uvolnila, a tím i poklesla jazyková kázeň, lze vyvrátit následujícím: Kdyby státy jen 1 promile toho, co vynaloží na zbrojení a jiné méně ušlechtilé účely, věnovaly k vybavení velkých edukačních esp. ústředí, jednotných

učilišť, především pro učitele, náležitě vybavily jazykovou Akademio de Esperanto, dotovaly nakladatelství, výrobní esp. filmů, esp. rozhlas a p., i tehdy by byla jednota a svezbytnost jazyka a zdárný vývoj zaručeny. Vždyť svět se s vývojem techniky a komunikačních prostředků stále více smršťuje a unifikuje.

Důvod, že jazyk je neschopný, je mrtvě narozeným dítětem, žije-li jeho uživatelé v nestejných společenských podmínkách, není obhajitelný. Na př. uživatelé anglického jazyka žijí dnes v nejrůznějších, nejkontrastnějších podmínkách na nejrůznějších místech zeměkoule — a přece to nezpůsobuje rozklad a zánik této řeči, spíše naopak. A totéž platí i o ruštině. A i esperantisté pronikli dnes do všech společenských tříd a do všech koutů světa — a ejhle, jazyk je podle zjištění prof. Dr I. Lapenny na posledních kongresech stále ucelenější, ve výslovnosti jednodušší a výrazově bohatší.

## Překládáte?

Dostáváme od našich čtenářů čas od času k uveřejnění jejich pokusy o překlad básní a písní. Bude prospěšné, uvědomí-li si každý překladaatel několik okolností:

Překládat do esperanta prozou je snadné, jde-li o jednoduché věci. Při náročných textech je nutné, aby se překladaatel hlouběji seznámil se strukturou a duchem jazyka; toho lze nabýt cvikem a pilnou a pozornou četbou.

Překládání veršů je již těžší, protože jde o jazyk přizpůsobený jistým formálním pravidlům, čili o řeč vázanou; a rozdíl ve struktuře obou jazyků jsou někdy velmi nesnadnou překážkou, má-li být zachována originální délka a kadence veršů. Také užívání básnických tropů a figur, zejména rýmu, není jen věcí mechanické rutiny. Zde už musí být nadání a cit pro estetický výraz, a mnohdy i vtip pro obratné vyjádření nesnadného místa, jež se vzpírá doslovnému překladu.

O to nesnadnější je překládání textů pro zpěv,

Jako Slované těšíme se upřímně z velkého rozšíření největšího slovanského jazyka, ruštiny. Ale známe i důvody, jež zabrání vskutku světovému rozšíření této řeči. Z nich prvním je nesporná nesnadnost tohoto jazyka zvláště pro neslovanské národy a dále rivalita ostatních světových řečí, angličtiny a francouzštiny, k nimž vbrzku přibudou španělština, čínština, a — jednou zas i němčina. A ze stejných zásadních důvodů, z nichž se esperantisté staví proti tomu, aby angličtina byla oficiálním mezinárodním jazykem (což by jen zvýšilo hegemonii jedné jazykové skupiny a určitých národů), odmítají, aby i kterýkoliv jiný národní jazyk byl vnucen celému světu za oficiálně mezinárodní. A tuto zásadu vyslovil již hodně dávno Komenský. Víťame rozšíření ruštiny jako protiklad a protiváhu angličtiny a jako faktor, který v budoucnu jednou přispěje k přijetí racionálně utvořeného mezinárodního neutrálního jazyka.

Jiří Kořínek

neboť zde přistupuje ještě další formální vázanost, totiž vázanost hudebním rytmem.

Základní pravidla esperantské poetiky naleznete v knize Kalocsay-Waringhien „Parnasa Gvidlibro“. Některé speciální otázky byly projednány česky v našich časopisech. Upozorňujeme zejména na tyto tři články:

Dr Půmpř: Rým (Ligilo 1939, č. 6—8, str. 39);

Dr Kamarýt: Verše v esperantu. Pojednání o rytmu v poesii. (Esperantista 1948, č. 2, str. 13);

Dr Fousek: Jak překládati zpěv (Esperantista 1948, č. 8, str. 83).

Na tuto knihu a na tato pojednání odkazujeme ty samé, kteří chtějí jít se svými překlady na veřejnost. Po- vězme si upřímně: Překládat verše nebo písně nedovede každý. To však nemusí nikomu ubírat chuti k práci na ostatním tak velkém poli esperantské kulturní činnosti.

T. P.

## Prof. F. Frantl: Antaŭ centkvindek jaroj naskiĝis J. Barrande

La Barrandov-aj filmfarejoj estas bone konataj en la tuta mondo kaj al la vizitantoj de Praha ne estas nekonataj ankaŭ ĝiaj terasoj kaj nagbaseno. Inter ili certe estas kelkaj, kiuj rimarkis sur ĝia kruta deklivo tabulon kun la nomo Barrande. Sed oni scias ĝenerale malmulte pri la homo, kiu donis sian nomon al ĉi tiuj lokoj, kaj pri la signifo de liaj sciencaj laboroj ĉiam vivantaj. Tamen tiuj ĉi fendoplenaj rokoj, tiuj ĉi geologiaj tavoloj, tiu ĉi muro de Barrande estas monumento al scienculo, kiu por longe markis per sia stampo la tutmondan sciencan paleontologian.

Joachim Barrande, franca paleontologo tutmonde fama, naskiĝis antaŭ centkvindek jaroj, la 10 de Aŭgusto 1799. Per liaj sciencaj reserĉadoj lia verko estis tre firme ligita al Ĉeĥoslovakio. Li dediĉis fakte kvindek jarojn de sia vivo al geologia esplorado en la ĉeĥa regiono inter Praha kaj Plzeň, kaj la rezultoj de li atingitaj restis dokumento necesega al la geologoj kaj paleontologoj nuntempaj.

Estante inĝeniero de pontoj kaj ŝoseoj, Joachim Barrande trovis vivorimedojn en Praha en la j. 1832 kiel politika elmigrinto. Li partoprenis en sekvantaro de la detroniĝinta reĝo Charles X. kiel ĥema instruisto de la duko de Chambord. Praha fariĝis por li dua patrujo, kiun li ne forlasis plu.

Lia atento estis altirita de krustacaj fosilioj, kiuj troviĝas tiom abunde en la ĉirkaŭaĵo de Praha. Li malkovris kuŝejojn en Křivoklát, kie li laboris kiel ekspertizisto ĉe konstruado de fervojo kaj li baldaŭ fariĝis granda kolekto de la ŝtoniĝintaj fosilioj. Li ekstudis ilin science.

En ĉi tiu tempo Bohemio (la okcidenta ŝtatparto de ĈSR — rim. de trad.) estis malmulte konata laŭ la vidpunkto orikologia (mineralogia). Publikiginte en 1836 siajn antaŭstudojn pri la krustac-fosilioj de tiu ĉi regiono, Barrande altiris al si atenton de la ceteraj scienculoj. En 1852 li atingis la kondiĉojn por eldoni la sian volumon de sia ĝiganta laboraĵo pri la siluriaj sistemoj de la Centra Bo-

hemio, kun metoda priskribo de ĉiuj kategorioj de la kambrio kaj devono. Tiu ĉi monumenta verko kun klasifiko de pluraj miloj da specoj okupis lin ĝis la morto en la jaro 1853.

Malgraŭ ĉi tiu absorbanta penlaboro, Barrande sciis trovi tempon por partopreni ankaŭ en paleontologiaj esploroj en kelkaj aliaj partoj de la mondo: en Belgio, Kanado, Hispanio, Germanio ktp. La dimensioj de lia sciencia verko estas vere eksternormalaj. Oni povas ankaŭ diri, ke li fordonis sin tute al sia tasko, kun ĉiuj siaj materiaj rimedoj.

Migrante tra la regionoj de Bohemio li komencis studi la ĉeĥan lingvon kaj li facile interkompreniĝis kun laboristoj laborantaj en la ŝtonrompejoj, kie ili kolektadis por li fosiliojn. En certaj lokoj oni fosis je lia propra kosto kaj lia loĝejo baldaŭ fariĝis efektiva muzeo. Aŭ, pli bone, tenejo, ŝtopita per fosiliaj animaloj kaj per teknikaj libroj, kie restis preskaŭ neniu loko por liaj labortablo kaj lito. Teni ĉion ĉi en ordo, estis dum longaj jaroj la ĉefa zorgo de s-ino Bábinka (avineto), lia mastrino, patrino de la poeto Jan Neruda. La juna Neruda mem estis dum kelka tempo sekretario de Barrande. Por eternigi la nomon de ĉi tu sindona virino, la sciencisto baptis „Bábinka prima“ unu el siaj specoj de amonitoj. Ankaŭ al aliaj specoj li atribuis nomojn pure ĉeĥajn: Panenka (Pupo), Královna (Reĝino), Mamínka (Panjo), Pantáta (Mastro) ktp. La romantisma interese de la epoko por la antikvaj manuskriptoj manifestis sian influon en la atribuo de nomoj tiritaj el la malnova ĉeĥa historio: Vlasta, Šárka (nomoj de heroaj virinoj), Vévoda (duko) ktp. Oni eĉ trovas eĥon de glora opero de Smetana ĉe Nevěsta vendita (Prodaná nevěsta, la Vendita Fianĉino). Alilandaj kolegoj, precipe en Germanio, levigis plenforte kontraŭ ĉi tiuj ĉeĥaj titoloj, sed la disputo estis fine decidita favore al Barrande, kies sciencia reputacio bone meritis ĉi tiun internacian rekonon.

Barrande viciĝas ankoraŭ hodiaŭ inter unuajn en la paleontologia esplorado. Dum sia tuta esplorista kariero li

montris sin fidela al la devizo, kiun li estis metinta ĉe la supron de sia unua verko: „Tio estas, kion mi vidis“. Lia verko restas klasika ekzemplo de esplorado ekzakta, objektiva, de realigado sen ombro de interpolo. Li pruvis, rilate al la ĉeĥaj popolo kaj lando, noblecon de sia konduto, pri kia oni havas malmultajn ekzemplojn inter la fremdaj scienculoj, restadintaj en Bohemio: lia grandega kolekto da realigado kaj ĉiuj dokumentoj, kiujn li utiligis, kun valoro hodiaŭ nekalkulebla, estis testamentitaj al la Nacia muzeo en Praha. Li klarigis tre simple tiun geston: „Ili devenas el la ĉeĥa tero, ili restu en ĉeĥa teritorio!“ Li samtempe donacis al la Muzeo sian multekostan bibliotekon kaj gravan sumon, destinitan por daŭrigo en liaj laboroj.

Per ĉi tiu nobla gesto la ĉeĥa popolo kaj la Nacia mu-

zeo fariĝis posedantoj de unu el la plej riĉaj paleontologiaj kolektoj en la mondo, kies graveco ne ĉesis kreski.

La klasifikoj de Barrande en aplikita paleontologio pruvis utilecon ne nur dokumentan, sed ankaŭ praktikan. Oni utiligas ilin nuntempe ĉe esplorado de terenoj, enhavantaj mineralojn kaj krudmaterialojn, necesajn por realigi taskojn, donitajn de la Kvinjara Plano al la industrio. La kultura ŝuldo de la lando al Barrande estas des pli granda.

Konservado kaj utiligado de liaj testamentaĵoj estas sekurigataj per zorgoj de la Nacia muzeo. Atento, dediĉata al kontinuiĝo de lia verko, konstruas la plej belan monumenton, per kiu oni povas homaĝi al la memoro de scienculo.

El „Parallèle 50“, n-ro 152, Parizo, tradukis J. Mařík.

**Athanasios Christopulos (1770—1847):**

### Anakreontská písnička

*Tak v zrcadlo se změnit,  
bys ve mně zhlížela se  
a abych já se mohl  
vždy pástí na tvé kráse!*

*Tak ve vánek se změnit,  
bych mohl nenadále  
k tvým zamyšlení nádrům  
a ovivat je stále!*

*Tak proměnit se v hřeben  
a zlehouchka si hrávat  
co chvíli s tvými vlásky  
a smět je rozčesávat!*

*A posléz: býti spánkem  
a přikrástí se v noci  
a ta tvá sladká očka  
ti ukolébat moci!*

Z novoĉeĥtinoj prelozil Miloš Lukáš.

**Athanasios Aristopulos (1770—1847):**

### Anakreoneca kanzono

*Se estus mi spegulo,  
por ke vi min rigardu  
kaj ke sub ĉarmo via  
en mi ĝojego ardu!*

*Se estus mi zefiro!  
Mi povus ja petole  
al via brusto flugi  
kaj blovi ĝin ventole!*

*Se estus mi kombilo!  
Mi povus ja dislimi  
hararon vian milde,  
kaj tuŝe vin intimi!*

*Kaj fine: esti dormo,  
por en mallumo veni  
kaj vian okulparon  
karese lukateni!*

El la novgreka tradukis Miloš Lukáš.

## KRONIKO ENLANDA

Ekspozicio pri „Klasbatalo de laboristaro el la tuta mondo“, kolektita kaj instalita de nia grupo en Plzeň kun helpo de Sindikata grupo ROH kaj Entreprena Organizaĵo de Komunista Partio en la Urbodomo la 16—27-an de Oktobro en la vestiblo de la Urbodomo, konsistis el dokumentaj afiŝoj, gazetoj kaj diversaj aliaj presaj diverslingvaj. La kolektitaj dokumentoj estas tre instruaj kaj la ekspozicio akiris gravan resonon ĉe la publiko. Vizitis ĝin 3000 p. kaj ni legis pri ĝi en ĵurnaloj Pravda (23. X.) kaj Práce (26., 29. X.), en tiu ĉi kun bildo. La ekspozicio meritas esti instalita ankaŭ en aliaj lokoj. Ĝi estis jam sendita al Rokycany, pluajn mendojn de niaj lokaj grupoj akceptas grupo de Plzeň (Gorkého 1), ĝi pruntas la materialon senpage postulante sole repaĝon de la sendkosto kaj garantian pri resendado.

Faktoj pri Danlando, la bela broŝuro informas, estis de ni dissendita al preskaŭ ĉiuj niaj lokaj grupoj. Ebligis tion donaco de la reĝa legacio dana en Praha.

Regiona manifestacia kongreso en Ostrava la 11—12-an de Junio (vidu paĝon 38!). Sabaton vespere okazis amuza programo, en kiu deklamis kaj kantis anoj de Komenský-societo, de la Klubo Ostrava I, kaj de Ĉs. Junulara Asocio, muzikis mandolinistoj de Ostravan, gvidataj de s-ro instruisto Lumír Bárta, fiore kantis membroj de spiritista societo Psyché kaj de Samaritana Helpo. La salono de la „Ligna reĝolando“ estis plenplena de ĉ. 200 vizitintoj, inter ili samideaninoj Fragonara el Svislando.

Dimanĉon estis ekstreme forta pluvego, kiu certe malbone influis la viziton. Venis al la kunveno en Junulara teatro je la 10 h. ĉ. 180 p., inter ili honora patrono de la kongreso prezidanto de Centra Nacia Komitato en Ostrava Josef Kotas. Krom el Ostrava ĉeestis esperantistoj el Kopřivnice, Opava, Vítkov, Háj, Bohumín, Darkov, Karviná, Stonava. Prof. Th. Kilian el Třebíč prelegis pri devizo „Esperanto en lernejojn!“. La prelego estis tre valora, la temo estis science pritraktata kaj la ĉeestantoj atente aŭskultis. Urbestro Kotas esprimis sian kontentecon pri kultura laborado de esperantistoj en Ostrava; ilia celado alportas jam nun utilan helpon.

Anstataŭ ĝardena festo okazis posttagmeze en restoracio Pěgřimek koncerto de blovorkestro el Karbominejo Hlubina, dum kiu vizitintoj entuziasme kun vervo dancis ĝis 22,30 horo. Inter la entuziasmaj dancantinoj estis ankaŭ la ambaŭ ĉarmaj gastinoj el Svislando, kiuj ne unufoje esprimis sian kontentecon kun la aranĝoj.

Krom aliaj pozitivaj sekvoj de la kongreso meritas esti rimarkigite, ke ĝi varbis pluajn partoprenantojn por Kursaro en Rožnov. (Laŭ raporto de A. Kubala.)

Rendevuo de esperantistoj el suda Moravio kunvenigis en Břeclav la 19-an de Junio 59 p. el diversaj lokoj, plej multajn el Brno. El Centra Komitato Asocia ĉeestis Rudolf Hromada. La gastoj venis dum matenaj horoj, trarigardis la urbon, je la 11-a h. estis komuna tagmanĝo, dum kiu salutis la kunvenintojn sekretario de E-Rondeto en Břeclav s-o Rudolf Trojna. Je la 12-a h. ili forveturis aŭtobuse al Lednice kaj vizitis tie la kastelon, „babilonan turon“, oranĝan ĝardenon. Pro tro malbona vetero ne estis eble viziti la mondkonatan parkon kun tropikaj vegetaĵoj. Sed tamen ĉiuj ĝesamideanoj forveturis tre kontentaj.

Unua laborkonferenco de la XII-a regiono en Vsetín la 2—3-an de Julio kunvenigis 97 p. el 17 lokoj. Centran Komitaton Asocian reprezentis Ant. Slanina. En la interkonatiĝa vespero la 2-an vespere prezidata de s-o Aleš Berka prezentis gejunula kantista fiore de Masaryk-lernejo el Gottwaldov, gvidata de s-o Fr. Blaha, kantojn en Esperanto kaj en la ĉeĥa. Poste s-o Blaha prezentis kelkajn filmojn, kiujn li akompanis per spritaj klarigoj.

La laborkunveno dimanĉan je la 10 horo malfermis prez. de la loka klubo Aleš Berka salutante la gastojn, precipe prezidanton de la ekspozicia komitato s-ron Josef Komoň, s-on A. Slanina kaj kantistajn geknabojn el Gottwaldov. S-ro J. Komoň salutis la kunvenon kaj emfazis utilecon kaj necesecon de nia movado. Estis sendita salutotelegramo al prezidanto de la Regiona Nacia Komitato Josef Kočíš. Regiona peranto Fr. Blaha skizis metodojn uzeblajn kaj vojojn ireblajn al nia fina celo. Lia kantista fiore kantis la himnojn kaj aliajn kantojn. Poste transprenis

gvidadon de la kunveno s-o Berka, S-o Ant, Slanina raportis pri agado kaj decidoj de la kongreso en Liberec kaj donis konsilojn por plua laborado en la regiono. Li tre rekomendis al aŭskultantoj de la radio-disaŭdigoj, ke ili konfirmu la aŭskulton kaj tiel firmigu pozicion de Esperanto ĉe Ĉs. Radio. Sekvis alparoloj de delegitoj el najbaraj regionoj, el kiuj precipe la vortoj de s-o Hargáš el Piešťany elvokis bruan aplaŭdon.

Estis elektitaj sekvaj distriktaj perantoj: Gottwaldov: Fr. Blaha; Vsetín: Aleš Berka; Uherský Brod: Jan Tichoň; Valašské Meziříčí: Kvita; Valašské Klobouky: Eger; Uherské Hradiště: Růž. Vilémová; Veselí n. M.: Jar. Pavlacky. Sekvis fotografado, komuna tagmanĝo kaj vizito de la ekspozicio. (Laŭ protokolo de Jan Tichoň.)

**Regiona konferenco de la III-a reg. en Plzeň la 4-an de Septembro en Slovanská beseda je la 10 h., kunvokita okaze de la Regiona Festo de la Komunista Partio, kunvenigis 30 partoprenantojn, inter ili ĉiujn distriktajn perantojn. El la Centra Komitato Asocia ĉeestis s-oj J. Valeš kaj T. Balda. Prezidis regiona peranto Frant. Kavan. Estis akceptitaj raportoj de perantoj distriktaj kaj tiu de la peranto regiona. La regiono havas nun 14 distriktojn. Estis reorganizita reto de distriktaj perantoj. Anstataŭ malsana Fr. Kavan estis elektita re-pe s-o Josef Reiser (Krajská správa spojů, Plzeň).**

**Tria slovaka Esperanto-kongreso la 30. VII.—1. VIII. en Bratislava kunvenigis ĉirkaŭ 300 p. krom el Slovakujo ankaŭ el Praha, Hradec Králové, České Budějovice kaj precipe el Moravio. Interkonatiĝa vespero okazis en Meštianský pivovar, dimanĉon okazis diservoj, poste je la 10-a horo en estinta YMCA jarkunveno de Slovaka Esperanto-Societo, kiun ĉeestis delegitoj de komisiito por informoj kaj klerigo kaj de la Nacia Komitato de Bratislava, kiuj salutis la kunvenon. Prezidis s-o Pavol Rosa, pri agado de la Societo raportis MUDr L. Izák. Poste estis elektitaj novaj funkciuloj: Prezidanto P. Rosa, vicprezidanto la plej maljuna esperantisto en Slovakio 76-jara Alojz Kramer el Košice, dua vicprez. Arnošt Váňa, unua sekretario Imrich Havaš. Posttagmeze estis ekskurso al Děvín, vespere teatra prezentado de „Fremda knabino“, lundon prelegoj kaj ekzamenoj pri lingva scio. (Laŭ ZAS)**

**Ekzamena komisiono kunsidis la 12-an de Novembro en Praha en restoracio Piskáček por ekzameni 5 kandidatojn de la ekzameno unuagrada kaj 9 de la duagrada. Ekzamenis pri la lingva scio Rudolf Hromada kaj Ing. Lad. Krajc, pri kapableco instrui du senatojn, konsistantaj el Dr Stan. Kamarýt prez., Mil. Lukáš, Pavol Rosa, Josef Vondroušek kaj prof. Jos. Kožený, prez., Ota Ginz, Dr Aug. Pitlik. Hejmajn taskojn klasifikis Dr Tomáš Pumpr kaj Dr Stan. Kamarýt, skribajn taskojn antaŭ la komisiono klasifikis Dr Pumpr, Rud. Hromada, Dr Aug. Pitlik, Ing. L. Krajc. Jen la rezulto:**

Diplomojn pri lingva scio de Esperanto ricevis: Jaromír Babička el Praha, Valja Flašarová el Bystřice p. H., Jan Neuman el Praha. Estis donitaj notoj 2 tre bone, 1 bone.

Diplomojn pri kapableco instrui Esperanton en lernejoj kaj kursoj ricevis (en krampoj estas temo de la hejma tasko):

Zdeněk Gregoriades, kandidato inĝeniera, Praha (Esperanto kaj tekniko).

Robert Halška, ekspastro de la Ĉeĥoslovaka Eklezio, en Kolin (Lingvo Esperanto kaj la biblia legendo pri la Babela turo).

Frant. Hrdina, oficisto en Praha (K. H. Borovský).

Josef Kavka, direktoro de meza lernejo en Příbram (Instruado de fremdaj lingvoj al infanoj).

Václav Kotrba, banka oficisto en Teplice (Esperantistoj kaj sporto).

Ladislav Kynčl, ĝardenisto en Praha (Mia kontakto kun ĝardenistoj kaj floriŝtoj alinaciaj helpe de Esperanto).

Vlastimil Severa, direktoro de meza lernejo en Doksy (Instruado de fremdaj lingvoj al infanoj).

Jaroslava Sichová en Háj ve Slezsku (Pozicio de ĉeĥa virino en la homa socio).

Miroslav Vacek, instruisto en Vejprty (La kaŭzoj kaj celoj de la husanaj militoj).

Estis donitaj notoj 3 tre bone kapabla, 6 bone kapabla.

Ni gratulas la sukcesintojn kaj dankas ilin pro ilia sindediĉo al lingvaj studoj.

### **Slovakaj kaj ĉeĥaj senatoj ĉe la Ekzamena Komisiono.**

La komisiono en sia plenkunsido la 12-an de Novembro en Praha dum ĉeesto de prezidanto de Slovaka Esperanto-Societo Pavol Rosa kaj redaktoro de Esperantisto Slovaka MUDr L'udovít Izák decidis krei ĉeĥajn kaj slovakaĵn senatojn ekzamenajn. Prezidanto de slovakaĵn senatoj estis elektita Paŭlo Rosa en Bratislava (Štefánikova 41), vicprezidanto Jan V. Dolinský en Turč. Sv. Martin. Prezidanto de ĉeĥaj senatoj estos prezidanto de la Komisiono Dr Stan. Kamarýt. Estis elektitaj pluj slovakaĵn membroj de la Komisiono: MUDr L'udovít Izák, kuracisto-specialisto en Turč. Sv. Martin, prof. Eduard V. Tvarožek, sekretario de Matica Slovenská en Turč. Sv. Martin, Koloman Kiss, oficisto en Bratislava. Pri lingva scio ekzamenos senatoj kandidatojn sen atento de ilia loĝloko. Pri kapableco ekzamenas laŭregule ĉeĥaj senatoj kandidatojn el la ĉeĥaj landoj, slovakaĵn tiujn el Slovakujo. Por esceptoj estas bezona interkonsento de prezidantoj de ĉeĥaj kaj slovakaĵn senatoj. Slovakaĵn kandidatoj anoncas sin en Bratislava ĉe prez. P. Rosa (Štefánikova 41), ĉeĥaj kiel ĝis nun ĉe sekretario de la Komisiono Dr T. Pumpr, Verdunská 8, Praha XIX.

**„Epizodo komencas“**, radio-dramo de Olga Horáková, tradukita de Ant. Slanina, prezentata de Verda Stacio la 2-an de Novembro kun reĝisoro Dalibor Chalupa estis certe tre atente aŭskultata de multaj pro bona komprenebleco de la aktorantoj. La artoprogramo de la Verda Stacio estas dissendata ĉiun unuan merkredon de la monato je la 23,00—23,45, se bezone ankoraŭ pli longe. Nepre aŭskultu ĉiun unuan merkredon de la monato sur ondoj 219 m, 259 m, 269 m, 325 m!

**„Ĉeĥoslovakio akceptis nin kiel reĝojn.“** Muzikkomponisto Jacob Feitsma, kies „Esperanto-marŝo“ estis elsendata de la Ĉs. rad'io, partopreninto de la nederlanda-belga karavano (v. p. 53!), skribis i. a. al s-ino Krista Holečková en Praha, kiu sukcesis loĝigi pli ol dekon da karavanoj: — „Nia vojaĝo tra via lando estis belega, mirinda kaj neniam forgesbla. En ĉiuj urboj oni akceptis nin kiel reĝojn. Kvankam multaj el ni jam vizitis sammaniere diversajn landojn, ĉiuj opinias, ke ĉi tiu glora rondvojaĝo superis ĉion. Multegan dankon al niaj simpatiaj, bonkoraj kaj gastamaj ĉeĥaj samideanoj! Ni neniam forgesos vin!“

Kiam doganisto en Rozvadov antaŭpaŝis la karavanon, atendantan valizkontrolon, kaj adiaŭis ilin per simplavorta, sed elkora paroladeto en la nomo de la ĉeĥoslovaka popolo, preskaŭ nenies okulo restis seka. Jes, la simplaj popolanoj diversnaciaj ĉiam trovas vojeton en la koron de l'aliulo. La ĉirkaŭbrako de la holanda karavanestrino kun la ĉeĥoslovaka doganisto konfirmis tion... (J. M.)

**Letero de Nederlanda-belga karavano al nia Asocio la 9-an de Aŭgusto el Rozvadov sur ĉeĥoslovaka landlimo:** „Forlasante la limon de via belega respubliko subskribitaj membroj de nederland-ŝlanda karavano esprimas al vi siajn plej sincerajn dankojn kaj substrekas, ke tuta vojaĝo estis eminenta sukceso kaj por esperantismo kaj por reciprokaj rilatoj inter nia esperantistaro. Vi montris al ni praktikan uzon de la lingvo, vi montris al ni, ke nia movado efektive vivas kaj pere de ĝi vi donis al ni multajn eblecojn enrigardi en la korojn de viaj tiel bonkoraj esperantistoj. Vivu via belega lando, viaj popoloj kaj esperantismo en la tuta mondo! Ĝis baldaŭa revido!“ Sekvas subskriboj de karavananoj.

**Subvencioj.** Loka Nacia Komitato en Ostrava donis 5000 Kĉs al unuigintaj esperantistaj societoj de la urbo por studenta junularo, kiu vizitis la kongreson en Liberec. — Nacia komitato en Žilina donis 5000 Kĉs al Slovaka Esperanto-Instituto por Esperantisto Slovaka. — Entreprena Sindikata Klubo en Svit donis al la Loka Grupo de SES 15.000 Kĉs. — Nacia Komitato en Hradec Králové donis 5000 Kĉs al E. Klubo en 1948 kaj 2500 Kĉs en 1949.

**Novan lernolibron por kursoj,** verkitan de Ant. Reček, eldonis ciklostilite E. K. en Karlovy Vary. Enestas XXII lecionoj, ĉiu sur unu paĝo grandformata. La aŭtoro klopodis enmeti en la tekstojn bonhumoron. Same li klopodis doni klarajn difinojn. Ambaŭ liaj intencoj sukcesis. Taskoj por traduko estas facilaj kaj postulas preskaŭ ĉiam unusolan tradukon. Tio meritas apartan laŭdon. La aŭtoro kaj la eldoninta klubo akceptu gratulon pro sia sindediĉo al la afero!

**Slovaka junularo favoras Esperanton.** Redakcio de slovaka revuo „Nedela“ ricevis antaŭ nelonge jenan leteron: „Regiona Komitato de Junulara Asocio en Bratislava en vicigas sin al ceteraj interesantoj pri rubriko „Samideano“, publikigata en la revuo „Nedela“ kaj deziras al vi kaj al via laboro multajn sukcesojn ankaŭ inter nia junularo. Ni kun ĝojo helpos vin, ĉar ni konscias, ke Esperanto estas unu el la rimedoj, kiuj povas kaj scias firmigi la malfacile elbatitan pacon. — Kun fratula saluto de ĉs. junularo: Zdravo! — Milan Lezo, organiza sekretario de Ĉs. Asocio Junulara, Bratislava.“ (eis)

**Morton de ĉeĥa poeto František Halas** (27. X. 1949, nur 42-jara) ni enskribas ankaŭ en nia kroniko kaj kun be-

daŭro tre profunda. Ĉar foriris poeto de neordinara talento, kiu sciis redoni komplikajn sentojn per versoj same komplikaj kaj tamen aspektantaj simplaj, sed kiu ankaŭ sciis batali en batallinio de progresema socialismo kaj trovi praktikan sintenon en ĉiu situacio, eĉ la plej komplika. Ni kontaktis kun li, kiam ni redaktis Ĉeĥoslovakian Antologion. La kontakto estis treege agrabla, ĉar li, unu inter nemultaj, sciis tuj kompreni nian situacion, ĝuste taksi valoron kaj ŝancojn de Esperanto kaj de la preparata libro kaj spontane demandis, ĉu li kaj kie li povos aĉeti la libron. Ne sole pro siaj poemoj sed ankaŭ per tiu saĝa sinteno li gajnis niajn korojn. Ni profunde malĝojas, ke tia homo mortis tiom juna.

## LINGVO

### Překlad úkolu 24.

**Odepsati.** Respondu<sup>1</sup> tuj, kion vi intencas fari. Kaj sekve ni tion dekalkulos<sup>2</sup> de la konto, ĉu? Tuj kiam<sup>3</sup> li enrigardis en la ŝparlibreton,<sup>4</sup> li ekkonis, ke iu mono estis deskribita.<sup>5</sup> Nia inventaro estas amortizita ĝis unu krono.

**Miniti.** Tion certe faris nia bubo, opiniis la avino. Kaj kion vi intencas fari? Mi intencas reveni post unu semajno.

**Těšiti.** Mi ĝojas, ke mi vidas vin sana.<sup>6</sup> Mi ĝojas pro lia sukceso. Mi devis lin, bedaŭrindulon,<sup>7</sup> konsoli.

**Složiti.** Li sidis kun kunmetitaj manoj. Kunmetitaj vortoj. La varo estis demetita el<sup>8</sup> la ŝarĝaŭtomobilo en unu horo. La aŭtomobilo estis malŝarĝita<sup>9</sup> en unu horo. Pro la malbona sanstato<sup>10</sup> li demetis sian funkcion. Kiu komponis la Venditan Fianĉinon? Li devos doni (deponi) garantiaĵon. Li ĵuris,<sup>11</sup> ke li parolos veron.

**Přičisti.** Al la rezulto ni alkalkulos cent. Por la priservado oni alkalkulas 10 procentojn. Oni aljuĝas<sup>12</sup> tiun akcidenton al hazardo. Ne imputu tiun malsukceson al mi.

**Opatřiti.** Tiun libron mi devas ankaŭ havigi al mi. Kiel vi volas havigi al vi la necesan monon? Por la longa vojaĝo ni prizorgis nin<sup>13</sup> per tolaĵo. La armeo estis bone ekipita. Li promesis, ke li tion prizorgos<sup>14</sup> (= že se o to postará), ke li tion havigos (obstará). En nia fabriko la laboristoj estas bone prizorgataj.

### Poznámky:

<sup>1</sup> reskribu; <sup>2</sup> deprenos; event. podle jinak chápaného smyslu: dekalkulu, deprenu; <sup>3</sup> apenaŭ; <sup>4</sup> ŝparkasan libreton; <sup>5</sup> deprenita; <sup>6</sup> mi ĝojas vidi vin sana; <sup>7</sup> malfeliĉulon, bedaŭrindulon; <sup>8</sup> de sur la ŝarĝaŭtomobilo; <sup>9</sup> nikoli kunmetita = složen dohromady. Aŭto estas ŝarĝata per varo (nebo deŝarĝata), kdezto náklad je (sur)metata nebo demetata; <sup>10</sup> pro motivoj de san(stato), pro sanstataj motivoj; <sup>11</sup> li ĵure deklaris; <sup>12</sup> atribuas. Věta měla znit: přičítají to neštěstí náhodě, bez čárky za „neštěstí“. Tak, jak byla vytištěna, zní její překlad: Oni aljuĝas (atribuas) tion al akcidento, hazardo; <sup>13</sup> provizis nin; <sup>14</sup> li promesis prizorgi tion.

Překlad tohoto úkolu zaslali: M. Adamcová, Brno; J. Babička, Děčín; J. Buček, Valašské Meziříčí; R. Bystřický, Cheb; V. Kithier, Bratislava; Vl. Kočvara, Rokycany; Jar. Koftán, Nová Ves u Pacova; Al. Kozárek, Olomouc; Frant. Kuba, Olomouc; Jar. Kuzník, Opava; Alfred Macek, Pulgáry; Jos. Oděhnal, Gottwaldov; B. Pagáč, Karl. Vary; Ant. Paul, Domažlice; Fr. Pospíšil, Olomouc; Ant. Schöblová, Beroun; A. Šmoldašová, Olomouc; Štěp. Šumavanská, Praha; P. Tichota, K. Vary; Ing. E. Tuháček, Krnov; Dr. Fr. Vaněk, Nová Role; A. Vavrušová, Praha; Mil. Vondroušková, Brno. Celkem 23 čtenáři. Odměnu za dobrý překlad dostává p. Kočvara.

Překlad úkolu 23. zaslali kromě již uvedených na str. 54 tyto členové: Dr. J. Černý, Litoměřice; V. Grossmann, Příbor; Frant. Kuba, Olomouc; Al. Kouřil, Šumperk; Boh. Němeček, Dobruška; Ant. Ráuvolff, Ml. Boleslav; Ant. Ráž, Beroun; M. Široká, Kaceřov; Stan. Valníček, Nivnice a J. B. Vlach, Praha.

## LOKAJ INFORMOJ

**Boskovice.** — La 19. X. propag. prelego de s-ano J. Friedrich el Brno, aranĝita de la Kleriga lernejo. Ĉeestis sole 13 p.

**Břeclav.** — R. Trojna aranĝis 27. IX. en 3 lernejoj por-esperantajn prelegojn de J. Friedrich el Brno. En industria lernejo aŭdis la prelegon 400, en komerca akademio 200 kaj en gimnazio 200 lernantoj. — Novan kurson por 25 p. gvidas J. Friedrich laŭ Kilian-lernolibro en kadro de Kleriga Lernejo Popola.

**Brno.** — La 8-an de Julio kunvenis pli ol 60 brnaj samideanoj por akcepti eminentan anglan literaturiston Reto Rosetti kaj lian ĉarman edzinon. Ili ĝuis ege interesan kaj valoran paroladon de nia sprita amiko kaj majstran artisman prezenton de liaj originalaj poemoj, de liaj tradukoj el angla poezio kaj reciton de kelkaj kantoj el Bapto de sankta Vladimiro, tradukita de Pumpr. La bela vespero signifas por ni refreŝigon de samideaneco. — La 4-an de Aŭgusto alvenis la nederlanda-belga karavano al Brno. Post trarigardo de subteraj grotoj en Blansko estis la karavano akceptita de EK Brno. Nederlandaj kaj ĉefiaj samideanoj prezentis al si fiore kaj reciproke naciajn kantojn. La 5-an de Aŭgusto okazis oficiala vizito al Centra Nacia Komitato de Brno, kies prezidanto (urbestro) Boh. Ubr akceptis la karavananojn kaj persone akompanis tra

la magistrata domo, donante historian skizon pri evoluo de la urbo. La urbestro gastigis la esperantajn gastojn en la plej ĉarma loko de Brno, ĉiu membro de la karavano ricevis de la urbestro luksan publikaĵon pri la urbo. La gastoj estis simpatie akceptitaj de la publiko, aperis longaj, tre valoraj artikoloj en la gazetaro. — La Klubo proponis al 70 lernejoj de Granda Brno informan prelegon pri Esperanto. La proponon akceptis sole 4 lernejoj. S-ano J. Friedrich prelegis 3. X. en Meza knaba lernejo Husovice al 110 lernantoj, 8. X. en Komerca akademio al 470 lern., 10. X. en Meza knaba lernejo Židenice al 70 kaj 4. XI. en Meza Knaba lernejo Žabovřesky al 320 lernantoj. Sume aŭdis la prelegojn 970 lernantoj kaj iliaj instruistoj. — Por nova kurso, aranĝita en kunlaboro kun la sindikata Instituto por modernaj lingvoj, propagandis dum pli ol 14 tagoj 550 afiŝoj en la urbo. La kurso komenciĝis la 15-an de Septembro kun 27 p. Instruas J. Vondroušek laŭ Kilian-lernolibro. — Programo de la kunveno: La 13. IX. Film-vespero (Jaroslava Konečná), 20. IX. Socialismo kaj Esperanto (Kano Kančev), Rakontado pri somera Esperanto-kurso en Karlovy Vary (Milada Vondroušková), 27. IX. Pentroarto kaj skulptarto de l'itala renesanco (Josef Vondroušek), 4. X. Esperantista movado en Moravio antaŭ 40 jaroj (Jos. Friedrich), 11. X. Fridtjov Nansen (Tomáš Borovec), 18. X. K. H. Borovský (Hilda Kořínková), 25. X.

Poezia vespero (Věra Borská), 1. XI. Letervespero, 8. XI. Jiří Mahen, la poeto de nia urbo (Jiří Kořínek), 25. XI. Historioj el antikva Brno, la dua parto (Marie Adamcová), 22. XI. Filmvespero (František Pospíšil), 29. XI. Donacantoj de vivo (Josefa Borkovcová), El mia infanaĝo (Frant. Vyskočil), 6. XII. Nikola vespero, 13. XII. La 90-a naskiĝtago de d-ro L. L. Zamenhof, 20. XII. Literatura vespero (Jar. Hoffner), 27. XII. Ĉe Nigra Maro (Stan. Sedlák), Spertoj el feria kolonio (Karel Rambousek).

**Brno-Židenice.** — Kurso por komencantoj laŭ Cseh-metodo kun 15 p., kurso por progresintoj 12—16 p. En ambaŭ instruas M. Jakubcová en Baza faka lernejo, str. Havlíčkova.

**Česká Lipa.** — La 26-an de Septembro komenciĝis kurso por komencantoj. Ĝi daŭros 10 semajnojn kun 2 lecionoj en semajno. Instruas laŭ Kilian-lernolibro kun aldonoj laŭ Cseh-metodo František Kotek kaj Jan Wildmann.

**Česká Skalice.** — Nova kurso por 20 p. iniciatita en aŭtuno 1949 de la EK en Hradec Kr. Instruas F. Vondráček.

**Dobruška.** — Kurso de la 3. II.—16. VI. komencita kun 25 p. finiĝis kun 21 p., gvidita de Stan. Borovka, profesoro de komerca lernejo. Kurskotozito estis 150 Kčs. La 23. VI. konstituiĝis rondeto kun provizora komitato 12-membra, prezidanto Stan. Borovka, sekretario František Švec, librobindisto.

**Doksy.** — En la meza lernejo estis fondita komence de Oktobro interesrondeto de Esperanto por la lernantoj de la tria kaj kvara klasoj. Partoprenas 25 lernantoj, instruas laŭ Cseh-metodo direktoro V. Severa. La lernejoj aŭtoritatoj montris grandan komprenon por fondo de la rondeto.

**Háj u Opavy.** — Prelego pri Esperanto la 24. IX. je la 19,30 horo.

**Hradec Králové.** — Nia grupo EK en Hradec Králové sendis interesan raporton pri la vizito de la karavano nederlanda-belga, el kiu ni devas nur koncize citi: Alveno la 3-an de Aŭgusto. La grupo aranĝis en restoracio Adalbertinum festan vesperon, kiun partoprenis pli ol 100 personoj. Bonvenigis prez. Dolanský, por la urbo en nomo de la Nacia Komitato kaj por la Kleriga Konsilantaro arĥitekto Ota Šmíd. Estis prezentitaj ĉeĥaj muziko, kantoj kaj poezio. Kantis samideanoj Mottlová kaj Černá, deklamis Vaňa kaj prof. Lukáš. Ĝis noktomezo restis ĉiuj en amika kunesto. Fine kantis la gastoj naciajn kantojn nederlandajn kaj sian himnon. Dum sia restado en Hradec Králové estis la karavano gasto de la grupo, kiu faris ĉion por kontentigi la eksterlandajn samideanojn. Ĝi sukcesis, juĝante laŭ adiaŭaj vortoj de s-ino Hellinx kaj s-o Feitsma. — La tre efika impresado de la karavano estis uzita por aŭtuna propagando, kiun favoris estroj de la Distrikta kaj Loka Klerigaj Konsilantaroj Dr. Kadečka kaj Ota Šmíd. Estis disdonitaj 20.000 flugfolioj invitantaj al la kursoj aldone al manĝokuponaroj. Komence de Septembro estis anoncintaj kursoj per multaj afiŝoj. Elmontra fenestro de la klubejo estis bele aranĝita de ĝesinoroj Vinař el Týniště n. Or. Ankaŭ la du propagandaj kestetoj estis bone ekipitaj per propaganda materialo. Post la 15-a de Septembro aperis novaj afiŝoj, sciigantaj precizajn horojn kaj ejojn de la kursoj. Rezultis kvar kursoj kun 90 partoprenantoj. Inter ili unu oficiala ĉe trafikdirekciejo fervojo. — En Sociala kaj Sanitara Lernejo prelegis pri E. prof. M. Lukáš al 150 studentinoj. — La klubo iniciatis ankaŭ kursojn kaj prelegojn en vasta ĉirkaŭaĵo, pri tio oni raportas sub nomo de lokoj. En la regiono kreskis la movado je 110 %, laŭ la plano. — La klubo ciklostilita bul-teno informas la mebrojn regule kvaronjare.

**Cheb.** — Kurso por progresintoj fare de Distrikta Kleriga Konsilantaro komenciĝis la 13-an de Sept. kun 23 p. — Jarkunveno de la Klubo okazis la 9. IX.

**Karlovy Vary.** — La vizito de la nederlanda-belga karavano estis iniciatita el korespondado de la klubanoj Žahourová, Kolář, Mašek, Paĝáč, Tichota. La karavano venis en la urbon la 31. VIII. kun rimarkinda malfruiĝo sur germana landlimo je la 10 h. En nomo de la Klubo salutis ilin prez. MUDr. F. Vaněk en restoracio Diana; en sia diskurso li komparis sortojn de malgrandaj nacioj. Post tagmanĝo venis la gastoj en la hotelon Pupp, kie la urba simfonia orkestro prezentis por ili koncerton el ĉeĥaj majstroj Smetana, Dvořák, Janáček, Novák, Nedbal, Vačkář, Fučík. La gastoj entuziasmiĝis kaj pro la programo kaj pro la prezento. Post vespermanĝo ĉe Pupp estis

la gastoj gvidataj tra la urbo, precipe al la fontoj por gustumi. Matene ili forveturis. — Kurson por komencantoj gvidas A. Reček laŭ propra lernolibro. Kurson aranĝas la Malsupra Kleriga Lernejo; 20 p.

**Košice.** — Nova kurso de s-o A. D. Kremer kun 45 p. komenciĝis la 12-an de Septembro. Aranĝas ĝin Kultura sekcio de poŝtovicistoj.

**Kyšperk.** — Nova kurso iniciatita en aŭtuno 1949 de la EK en Hradec Kr.; 17 partoprenantojn instr. Jiří Bednář.

**Liberec.** — Aperis en Oktobro 3-a numero de la Kluba cirkulero „Nia vojo“, redaktita de Ing. K. Fanta, kiu raportas ĉeflingve detale pri la kongreso. Tre utila faro.

**Lichnov u Frenštátu p. Radh.** — En lernejo okazis la 3-an de Julio E-ekspozicio. En la memorlibro estas enskribitaj 170 vizitantoj, kiuj kun granda intereso rigardis la ekspoziciitajn esperantaĵojn.

**Mimoň.** — La E. Klubo festis la 5-an de Novembro la unuan datrevenon de sia fondiĝo kaj konstatis kun fiero, ke ĝia ekzisto firmiĝas kaj agado disvastiĝas. Ĉe tiu okazo la Klubo esprimas publike dankon al siaj fondintoj kaj unuaj gvidintoj s-oj Karel Šolc kaj Václav Špür. El la agado dum la unua jaro estu enskribita tie ĉi, ke la kursfinan feston la 23-an de Aprilo partoprenis kiel rolantoj la eminentaj aktoroj el Praha Zd. Procházková kaj Karel Höger.

**Nejdek.** — la 15-an de Junio estis elektita komitato de la Loka Grupo. Prez. Fr. Karika, sekretario M. Hegrová, protokolistino Vl. Pešutová, kasistino M. Hofmanová.

**Nový Bor.** — Ĉiujaŭde je la 20-a horo kunvenoj en la komunuma entrepreno Vicenik. Estis farita interkonsento kun samideanoj el Česká Lipa pri kunveno almenaŭ unufoje monate en loko proksima al ambaŭ urboj. Karel Šolc el Mladá Boleslav instruis en Majo 30 komencantojn. Finis la kurson 22 p.

**Olomouc.** — La E. Societo akiris novan klubejon en la Žerotín-domo (kontraŭ la Dominikana preĝejo). Kunvenoj ĉiujn ĵaŭdojn je la 19—21 horo. — Ĉeĥlingva „Informilo Haná-Jeseníky“ meritas esti laŭdata post ĉiu 2-paĝa numero.

**Opava.** — En la filatelista ekspozicio la 15—23-an de Oktobro estis du ŝrankoj dediĉitaj al esperantaĵoj. — Al gvida oficisto de la Kleriga Konsilantaro inspektoro Jan Pišala estis la 9. IX. transdonita de nia loka grupo diploma pri honora membreco en la grupo pro lia subteno de nia laborado. — El membroj de la grupo 7 vizitis la kongreson en Liberec, 6 estis sur la monto Čantoryja, 1 en kongreso en Bratislava. Ankaŭ tio ilustras vigan vivon de la grupo. — Depost la 28. IX. la membraj kunvenoj okazas en Kulturní dům (apud Orienta stacidomo) ĉiumerkrede je la 19—21 horo.

**Ostrava-Zábřeh.** — Esperantista Societo Komenský dum sia ekskurso al Sv. Hostýn la 9-an de Oktobro haltis en Bystřice p. H. por honorigi la unuan pioniron de la movado s-on Th. Čejka. Ĉiuj 51 ekskursantoj kuniĝis kun esperantistoj el Bystřice p. H. kaj gvidataj de s-ino Valja Flašarová venis al domo de Čejka en Podlesí. Maljuna freŝa mastro akceptis ilin tre afable preminte al ĉiu vizitanto la manon. Prezidanto de la Societo Alois Kubala salutis la malnovan batalinton en entuziasma diskurso kaj transdonis al li kiel simbolean donacon bildon kaj ministan lampon. Aŭtoro de la simbolo s-o Ant. Chrápavý deklamis propran poemon al Čejka dediĉitan. Poste Th. R. Čejka montris al siaj gastoj kolekton de siaj eldonaĵoj kaj ĉiujn regalis. Kortusite disiris fine tiu edifanta kunveno.

**Pardubice.** — La klubo havas novan ejon en Řemeslnická beseda, str. U divadla. Kunvenoj ĉiuvendrede je la 20 h. Korespondo al s-o F. Nálevka, 1, účtárna Krss.

**Plzeň.** — Ĉar la nombro de membroj transpasis centon, la grupo sendis en la Centran Komitaton kiel anon s-on Frant. Kastner (Papirnická 2). — La nederlanda-belga karavano venis en la urbon la 8-an de Aŭgusto je la 13 h., atendata de ĉ. 30 samideanoj. Post la tagmanĝo vizito de la urbdomo, kie ilin akceptis la urbestro Meinzer persone. Ĉiu gasto ricevis donace insignon de la urbo Plzeň. Post trarigardo de la bild-galerio promeno tra la urbo en grupoj. Post la vespermanĝo en Slovanská beseda parto de gastoj vizitis filmfestivalon, estis kondukita al lokoj por fremduloj, salutitaj per disaŭdigo kaj brue aplaŭditaj de 7000 ĉeestantoj. Sekvan matenon la karavano forvetu-

ris en fruaj horoj. — La Popola Altlernejo havas en sia prospekto inter 9 lingvaj kursoj ankaŭ Esperanton. La kursoj estas po 30 horoj, kurskotizoj po 100 Kčs. — La starigo de la grupo estis oficiale aprobata de Distrikta Nacia Komitato (ONV - okr. vel. NB 28. 6. 49 ĉ. 3510).

**Praha.** — La Klubo en sia ĉiusemajna kunveno, okazinta la 1-an de Junio, solenis la 150-a datreveno de la plej granda rusa poeto A. S. Puŝkin. Vervoplena diskurso de la prezidanto Ŝustr estis tre atente aŭskultata kaj entuziasme aplaudita, same s-ano M. Nývlt pro bele recitata poemo „Droninto“ de Puŝkin. Poste muzikis Biró-kvarteto, pri kiu vidu p. 44. (V. L.)

**Prešov.** — Kurson por fervojistoj gvidas Andreo Beisezter (depost Septembro).

**Rychnov n. Kn.** — En kunveno de lernejoj de la distrikto parolis en Oktobro prof. Miloš Lukáš pri Esperanto.

**Tábor.** — En gimnazio instruas Esperanton kiel laŭvolan objekton al 23 studentoj prof. Dr H. Jokl. — En Instituto de Modernaj Lingvoj gvidas kurson por 38 p. s-o Fr. Knotek. La kurso komenciĝis en Oktobro, post unu monato eĉ ne unu kursano ĉesis ĝin viziti. Al la kurso invitadis multaj afiŝoj en oficejoj, butikoj kaj sur afiŝejoj. S-o Voňavka, sukeraĵisto, faris en sia elmontra fenestro tre impetan ekspozicion el leteroj, gazetoj, prospektoj, libroj. Certe ankaŭ la bonega impresio post la nederlanda-belga karavano multe levis la ĝeneralan opinion pri nia afero. (Dr H. Jokl)

**Tanvald.** — La loka grupo de EAĈSR aranĝis aŭtunan kurson por komencantoj. Laŭ Kilian-lernolibro instruas Evžen Belda 23 p., plejparte junajn laboristojn.

## RICEVITAJ LIBROJ

**Leteroj de L. L. Zamenhoj.** La tragedio de lia vivo rivelita de lia ĵus retrovita korespondo kun la francaj eminentuloj. Prezento kaj komento de Prof. G. Waringhien, II, 1907—1914. Eldonis SAT, 67 Avenue Gambetta, Paris 20. 1948. — Paĝoj 376, 15×19 cm. — Dua volumo ĵus aperis en la sama aranĝo ekstera kaj interna. Ankaŭ ĝi estas dividita en tri „aktojn“. La kvara: La Konflikto kun Ido. La kvina: La kontinueco de Esperanto. La sesa: La Konstitucio de Antverpeno. Do estas unu akto pli ol postulas por tragedio la Aristotela dramaturgio. Ankaŭ la absolve de la heroo (la kathariziso) estas kontraŭ dramaturgio. Dum tiuj dek tri jaroj (la unua letero estas el 28. V. 1901, la lasta el 7. I. 1914) ni ne trovas kulpon de la heroo. Unufoje Zamenhoj hezitis antaŭ tento: ĉu akcepti la 250.000 frankojn. Li ne hezitis longe kaj rifuzis: ne por konservi la supersignojn, sed por konservi sian liberecon, sendependecon de malriĉulo kontraŭ la potenculo de tiu ĉi mondo. Legu tiujn leterojn ripete ni ĉiuj, kiuj tiom ofte cedis, cedas kaj cedos antaŭ la malbono! Por honti, por plori, por ekzalti nin, sen rezulto videbla! Sole por konscii, ke ni kontaktis kun homo genia ankaŭ etike. Tial la dramo, pro saĝo de la realo eĉ pro artisma sento de la prezentanto, finas per Zamenhojaj vortoj de trankvila optimismo en letero al generalo Sébert: „La pasinta jaro estis por ni efektive tre malfeliĉa; tamen ni ne havas kaŭzon por malesperi, ĉar ĝuste tiu fakto, ke malgraŭ la tre gravaj perdoj nia afero trankvile iras sian vojon — tio devas konsoli nin, ke nia afero jam ne dependas plu de apartaj personoj kaj cirkonstancoj... Estas vero, ke nia afero ne faras nun grandegajn progresojn; sed ĝi fortike vivas, kaj tio jam sufiĉas. Pli aŭ malpli frue niaj malamikoj lacigos kaj tiam nia afero potence ekfloros.“ G. Waringhien meritas senrezervan laŭdon pro sia komento kaj ĝenerala kunmeto de la libro, kiu ebligas kompreni situaciojn tiamajn kaj konkludi el ili pri vivanteco de Esperanto, kiu enestas en la lingvo kaj en la esperantistoj same.

**Gvidlibro pri Parizo,** eldonita de SAT, 67 avenue Gambetta, Paris 20, okaze de ĝia 22-a Kongreso, 62 paĝoj, 14×20 cm, 11 bildoj, 9 planoj, 1 ĝenerala mapo pri Parizo. Prezo — 66 us. dol. — Gvidlibro laŭ ĉiuj vidpunktoj modela, klara teksto senerara, bonaj bildoj, ĉar estis uzita unuaranga papero. Laŭ SAT-maniero ĉiuj nacilingvaj nomoj aperas en esperanta ortografio: Levo (= Le Vau), Lebreŭ (= Le Brun), Franŝe d'Espere (= Franchet d'

**Trenĉin.** — La 12-an de Oktobro elektis la loka grupo de SES la sekvantan novan komitaton: Prez. Rudolf Bušo, vicprez. Fr. Brynza, sekret. Jozefka Gazdíkova, kas. Jolana Stoklasova, I. peranto por lernejoj prof. Jaroslav Procházka, II. perantino por lern. aferoj Anastázia Flimmelova, reviz. Julia Zoubekova kaj Anna Petruchova. Distrikta peranto Imrich Klas, loka peranto Imrich Hlavaty.

**Týniště n. Orl.** — Laŭ iniciato kaj per kunlaboro de E. K. en Hradec Král. estis en kunlaboro de la Loka Kleriga Konsilantaro en printempaj monatoj aranĝitaj du kursoj, por plenaĝuloj kaj por infanoj. Komence aliĝis sume 64 p., ĝis fino restis 24, kiuj ĉiuj aliĝis al la Asocio. La 1. VII. okazis letervespero, al kiu venis 31 leteroj el 13 landoj. La 22. VI. vizitis parto de klubanoj klubon en Hradec Králové. Ekestis amika kaj familia kontakto inter la du kluboj. La 7. VII. estis elektita prepara komitato por fondi lokan grupon. La aferon gvidas s-o Valda Vinař. — En aŭtuno nova kurso por 25 p. Antaŭ la kurso okazis prelego de Miloš Lukáš.

**Úpice.** — Nova kurso por preskaŭ 100 p. iniciatita en aŭtuno 1949 de la Klubo en Hradec Kr., gvidas Kopecký.

**Ústí n. L.** — Nova prezidanto de la grupo: Karel Kočí, Štřekov II, ul. Brí Mrštíkú 8.

**Vsetín.** — Esperanto-stando en ekspozicio „Valaĥio laboranta“ estis vidita de ĉirkaŭ cent mil vizitintoj. — La kongreso de Liberec vizitis membroj kaj gastoj karavane (25 p.). Revenante ili haltis en Praha, trarigardis la urbon gviditaj de s-ino Dandová. — Nova kurso komenciĝis en Oktobro gvidata de s-o Aleš Berka por 25 p.

Esperej), Ljote (= Lyautey) k. s., kio estas utila precipe en libro, kies celo estas gvidi. Estas grave, ke originala ortografio estas ĉie aldonita. Instruaj estas tradukoj: Tegoleja ĝardeno = Tuilleries, Stela placo = Place de l'Etoile ktp. (O. G.)

**Agostinho de Silva, Historio de Nederlando.** El portugala lingvo tradukis José de Freitas Martins. Eldonis Portugala Eldona Rondo, Porto 1948, 32 pĝ 13×18 cm. Prezo Kčs 7,—, sed disvendita. — Jen kvara kajero de II-a serio de la bonega Enkonduko en la kulturon, kiu en siaj malgrandaj verketoj donacis al ni jam tiom da instrua materialo. Ankaŭ la nuna broŝuro estos bonvena al multaj, kiuj ĉerpos el ĝi informojn, ne tute facile en tiu koncizo aliloke troveblajn. Surestas noto pri kontrolo per Literatura Komitato de F. L. E., sed ni tamen kritikus kelkloke la tradukon. Anstataŭ: ŝtormo, dum kiam (3) ni dirus: dum kiu, anst.: akcepto je kio (4) akcepto de kio k. s. La frazo: „La fondo de la Kompanio... signifis elfarado de la volbo de la tuta nederlanda komerca konstruaĵo“ farigis komprenebla nur post bona pripenso. Kiam oni parolas pri Karlo V-a, ni aldonus, ke temas pri hispana reĝo. Ĉie elstaras la progresema vidpunkto de la aŭtoro, kio faras la eldonaĵon des pli salutinda. (O. G.)

**Karl Lindqvist, Ferio kun la morto.** Dansk Esperanto-Forlag, Aabyhøj 1948. 72 pĝ 15×22 cm. Prezo 3,50 d. kr. — Historio pri misteraj murdoj, okazintaj en mara banloko. Bonhumora polica inspektoro, kvankam ferianta, helpas ilin solvi. Postulemaj legantoj de detektivaj romanoj dezirus verŝajne pli grandan streĉon kaj aldonon de pliaj komplikajoj kaj de solvo neniel atendebla, al iuj ŝajnos eble la nombro da kadavroj ne sufiĉas, al ni, nespertaj legantoj, kaŭzis la libro tamen tute senteban frostotremon kaj ni ne povis ĝin formeti antaŭ la lasta paĝo. La stilo estas flua, enestas pluraj bone elektitaj kaj akceptindaj esprimoj: kortservistino, rompŝtelisto kaj domrabisto, kunhomoj, ruzosperta, loĝnutraĵo, aginst'nkto, serĉrigardi pri eliro, pajlejo, pajlhaka maŝino, talpteraĵo k. a. Ni estis tamen surprizitaj, trovinte reĝule malĝustan tempon de pasiva partecipo: mortis kaj estis entombigata 26, 41 (anstataŭ: entombigita), murdinto baldaŭ estos kaptata 28, 63 (anst. kaptita, ĉar temis pri rezulto de la kupto), Ellen estis murdata 47, 55, John estis murdata 52 (dufoje). Tiu ĉi originala detektivromano trovas multajn ŝatantojn en nia lando, se ni povus ĝin havigi. (O. G.)

**Rekta vojo al lingvosocio estas serio de 4 broŝuroj:** 1. „Vojmontrilo al tutmonda korespondo“, kiu instruas finnlingve gramatikon de Esperanto (50 finaĵojn kaj afiksojn kaj 500 memstarajn vortojn). 2. „Mary kaj Sulo“, rakonto en formo de korespondado plene komprenebla per kono de la „kerno“. 3. „Taglibro de kongresano“, en kiu fina terkulturisto rakontas pri sia hejma vivo kaj kongresa vojaĝo; tiu libreto instruas pluajn 750 vortojn. 4. „Olimpia Esperanto“ instruas la vortojn kaj esprimojn, necesajn por preparoli olimpian sporton. 5. Kiel alfabeto vortaro estas rekomendata la „Slosilo“. Eldonis tiujn tre sprite redaktitajn broŝurojn Eldono Vilho Setälä en Helsinko, Finnlando. Ni gratulas al finnaj samideanoj pro tiuj ĉi tre uzablaj lerniloj.

**Esperanto-Schnell-Kurs** von Hans Koch, München, Prüfungs-komisar beim Esperanto-Institut München. 2. Ausgabe. Oskar Ziegler & Co Deisenhofen-München. 52 paĝoj 11×15 cm. Ĝi estas dua eldono de lernolibreto post 25 jaroj, aperinta en Julio 1949. La aranĝo estas plaĉa, la tekstoj seneraraj, la proponata provizo de vortoj taŭga. Anoncoj sur la kovril-paĝoj ofertas novajn eldonaĵojn de la eldonejo (dua eldono de Bartelmes-traduko de Faŭsto I kaj komentario al Faŭsto I de Butin kaj originalan romanon de Sayers Invito al celo) kaj malnovan antaŭnazistan verkon „Albrecht Dürer“.

## ESPERANTISTA VIVO

**Mortis František Kavan**, unu el la plej malnovaj niaj kunlaborantoj, regiona peranto en Plzeň. Li naskiĝis la 11. de Majo 1875 en Vel. Malšovice, vivis kaj laboris en Plzeň kiel tre ŝatata komercisto kaj aktiva funkciulo en diversaj komercistaj organizaĵoj, honorigita dum maljuneco per titolo de Komercĉambra konsilisto. Li esperantiĝis en 1906 kaj post Xaver Kutilek kaj Jar. Schwarz baldaŭ fariĝis gvidanta persono inter esperantistoj en la okcident-bohemia metropolo. Kun B. Tittel kaj I. Gross li fondis en 1918 gazeton „La Progreso“, kiun li gvidis administracie ĝis 1923, kiam la gazeto transloĝiĝis en Prahon. La tiama intereso de fremdlando pri la nova respubliko kaŭzis, ke La Progreso dum lia administrado havis relative multajn abonantojn ekster nia lando, kaj ankoraŭ pliajn legantojn. Dum tiuj jaroj estis Kavan ankaŭ ĉefdelegito de UEA. Kiam ankaŭ tiu ĉi funkcio transloĝiĝis el Plzeň, li estis kelkajn jarojn loka delegito kaj komencis kun V. Pečeč organizi esperantistojn el la tuta regiono, el kio rezultis ligo de „Okcidentbohemaj Esperantistoj“, en kiu enestis 8 grupoj de Plzeň kaj kelkaj el okcidenta Bohemio. Post la dua mondmilito estis Kavan prezidanto de tiu ĉi organizaĵo kaj samtempe akceptis funkcion de regiona peranto; li klopodis fervore starigi perantojn en ĉiuj distriktoj de la regiono. Kiam oni fine sukcesis kunigi ĉiujn esperantistajn aktivulojn en Plzeň en unusolan grupon de EAĈSR, estis Kavan elektita ĝia honora prezidanto, kaj laboris seninterrompe kiel regiona peranto ĝis sia morto la 25-an de Oktobro 1949. Sed per tiuj ĉi sekaj faktoj nenio estas dirita pri persisto kaj fervoro, kiun li ĉiam dediĉis al nia celado, nek pri lia karaktero honesta, nek pri lia laboremo senpaŭza, nek pri lia fido al eblecoj de praktika idealismo. Precipe pro tiu ĉi fido li estis kara al ni kaj li ne estos forgesita.

## VELKÝ SLOVNÍK ČESKO-ESPERANTSKÝ OD BRATRŮ FILIPŮ

656 stran, v plátně váz., již rozesíláme. Cena 390 Kčs, poštovné (doporuč.) 11 Kčs. - Objednejte u Knihkupectví Svazu esperantistů ČSR, Praha, poukazem na jeho účet psp. čís. 12.371.

K tomuto číslu přikládáme složenku k úhradě členského příspěvku na rok 1950. Základní členský příspěvek je 100 Kčs, — za kalendářní rok; příspěvek pro vojáky, studující a učně 50 Kčs, — pro rodinné členy 25 Kčs, —. Předplatné časopisu do ČSR zásadně nepřijímáme. Každý člen, kromě rodinného, dostává časopis zdarma. Propagační předplatné na adresu do ciziny, nám udanou, je 100 Kčs, — za ročník a přijímá se zásadně na dobu kalendářního roku.

## KORESPONDI DEZIRAS

Aleksandro Sipos, 19-jara komercisto, Rákóczi Ferenc str. 68, Szentes, Hungario, kun ĉeĥa fraŭlino, kaj intŝ. PK.

Ladislav Orosz, 19-jara, abiturienta ekzam., Csergő Károly str. 33, Szegvár, Hungario, kun studentino kaj intŝ. PK.

K-ino Iona Combás, 15-jara studentino, Nyíri-köz 2, Szentes, Hungario, kun studentino kaj intŝ. PK.

Hub. Hermans, ministro, Pr. Bernhardstr. 4, Vaals, Nederlando, kun ĉeĥaj ministoj.

Išida Masahisa, Honĉo 45, Kameda-mura, Hakodate-ŝigaj, Japanujo, volas ĉs. adresojn por siaj lernantoj.

Josef Bahula, Lán 45, Uherský Ostroh, intŝ. pm. kaj IK.

## Mladým o starém muži

**O zemřelém Stanislavu Otrubovi**, říd. učitelu v Těšeticích u Ol. (viz str. 63), napsal v dopise našim přátelům v Olomouci anglický esperantista, autor obširného anglicko-esperantského slovníku, Bernard Long:

Poznal jsem Stanislava Otrubu z esperantské korespondence roku 1908 a od těch dob trvala výměna dopisů mezi námi, přerušena jen dvěma válkami, stále až do jeho smrti. Ještě týden - dva před smrtí odpověděl mi na dotaz o českých, slovenských a slovinských pojmenováních. V tom dlouhém údobí pojednali jsme o mnohých otázkách a stali jsme se opravdovými přáteli. Obdivoval jsem pronikavost jeho myslí, jeho talent hudební a malířský, ale nade vše jeho vynikající charakter a lásku k člověku. Poznati se s ním osobně měl jsem příležitost až r. 1937, kdy jsem měl veliké potěšení navštívit ho v Těšeticích a býti od něho přijat pohostinsky, a nejen od něho, ale i od ostatních samideánů a přátel v místě.

Bez přátelství s Otrubou byl bych sotva navštívil jeho vlast; mnoho jsem se o ní dověděl z dlouhého našeho dopisování. Velmi doporučuji každému Čechu, který chce rozšířit známost o své zemi a o svém lidu mezi obyvateli jiných zemí, aby se učil esperantu a používal ho, neboť ono překonává hradby jazykových potíží a umožňuje těm, již ho užívají, sdělovat myšlenky svobodně a nenuceně na podkladě jazykové rovnosti, jako mezi krajany. Žádné zařízení nemůže působiti obdobně mezi lidmi všech zemí, všech tříd a všech zájmů.

## Mladým od organisátora mladých

Samideáni a samideánky! — Byl jsem 26. X. 1949 v klubu pražských esperantistů, která měla ráz propagační. Napadlo mi tohleto. Vite, ony všelijaké ty učené řeči nepřitahují, pozoroval jsem však, s jakým velkým zájmem sledovali všichni přítomní (i neesperantisté) vyprávění veselých příhod, jaký ohlas měly právě u neesperantistů. — Tak si myslím, že bychom je neměli nechat zapadnout v zapomenutí. Že by byly dobrou propagační pomůckou. Sesbírány od všech ěs. esperantistů (doplňeny event. několika příhodami zahraničních esperantistů), vydaly by za pěknou knihu. — Myslím, že by to za pokus stálo, sesbírat stovku veselých příběhů z působení našich esperantistů (hlavně těch starších) a vydat je tiskem. Myslím, že by byly mnohem přesvědčivější, než jakákoliv moudrá přednáška. To je prakse, a ta je vždy přesvědčivější, než sebevice theorie. Zatím něco podobného postrádáme. — Neškodilo by i učebnice takovými příhodami doplnit, aby se staly živějšími. — Název bych navrhol takhle: „Lidičky, jak je ten svět maličků“. — Ano, nám esperantistům je opravdu svět maličků. Hledejme nové metody propagace! — A co takové MEVRO? Co naše „Verda stacio“, nesvedli byste něco podobného? Čím veselší historka, tím je přitažlivější. Když tak na sebe samideáni prozrazovali různá ta tajemství, ani nevíte, jak to působilo. — Tož ne přemoudrá přednáška o potřebě mezinárodního jazyka na zahájení kursu, ale zábavné pásmo ze života našich lidí a uvidíte, že vám přistě přijde kuristů dvakrát tolik. — SEL-agento St. Lešingr.

**Důležité:** Členové místních odboček, informujte se na výřt členského příspěvku na příští klubové schůzi. Svazový příspěvek platíte pak pouze prostřednictvím svého klubu (odbočky).

Vychází měsíčně (10krát do roka). Majitel, vydavatel a nakladatel Svaz esperantistů ČSR v Praze II, Malá Štěpánská 7. Odpovědný zástupce listu Dr Stan. Kamarýt. Členům Svazu zdarma. Členský příspěvek 70 Kčs. Účet pošt. spoř. 9.602. Tiskne «Oli» v Karl. Varech. Účet na poštovní noviny službě povolena red. pošt. v Praze č. j. IA-Gre-2372 OB-48. Dohlédací poštovní úřad Praha 022.



# TABELO DE ENHAVO

## ĈEĤAJ ARTIKOLOJ

Jiří Kořínek: Suďte podle faktů! (Ni juĝu laŭ la faktoj)	73
Adolf Malík: Být či nebýt esperantistou (Ĉu esti aŭ ne esti esperantisto)	17
" " Náš pětiletý plán (Nia kvinjara plano)	10
" " Naše kraje (Niaj regionoj)	9
S. K.: Ideové školení esperantských pracovníků (Ideologia klerigado de esperantistaj funkciuloj)	1
" Esperantské léto (Esperantista somero)	49
" Propagovat nebo učit (Ĉu propagandi aŭ instrui)	25
Dr. W. Solzbacher: „Jazykový boj“ zuří ve spojených národech („Lingvobatalo“ furiozas en Unuiĝintaj Nacioj)	33
Resoluce sjezdu v Liberci (Rezolucio de la kongreso en Liberec)	41
Také occidentalisté (Ankaŭ occidentalistoj)	64
T. P.: Překládáte? (Ĉu vi tradukas?)	74

## ESPERANTAJ ARTIKOLOJ

MUDr. J. Černý: Esploro pri aktiveco de tuberkulozo	18
F. Frantl: Antaŭ 150 j. naskiĝis Joachim Barrande	74
Jan Mukařovský: Socialista partio en scienco kaj arto	25
O. G.: Nia kongreso en Bournemouth	49
K. Pič: Esperantaj neologismoj	57, 65
S. K.: Vlado Jukl	50
J. Šupichová: Novaj libroj	34
del Valle Inclán: Partizana ĉefo	2
Rezolucio de la kongreso en Liberec	41
Ĉe okazo de 70-a naskiĝtago de generalisimo Stalin	73

## POEMOJ

Ath. Christopoulos-M. Lukáš: Medikamento kontraŭ febro, Lék proti horečce	19
Anakreoneca kanzono	75
Adolf Malík: Rememoro pri mia mortinta edzino	15
K. Pič: Vespera psalmo	19

## LINGVO

Traduka tasko	20	5, 27
	21	5, 27
	22	21, 37
	23	37, 54
	24	54, 77
Uzo de „da“		21
Tro vasta kaj multrola uzado de „de“		21
Prezidento		21
V. Kotrba: Terminoj por infanludoj		44

## MOVADO

Akademio de Esperanto	56, 60
Kongreso Bournemouth	7, 31, 49
Kongreso Parizo	71
Kongreso Liberec	15, 23, 32, 33, 38, 44
Kongreso Bratislava	38, 47, 76
Ekzamena komisiono	4, 7, 44, 51, 62, 76
Lernejo kaj Esperanto	
Kursaroj: Doksy	8, 24, 32, 40, 50
Karlovy Vary	32, 40, 51
Rožnov	24, 52

Nederlanda-Belga karavano	23, 72
Radio: Listo de mallongaj dissendoj el ĈSR	44
Sveda	32
Elsendoj el ĈSR	63
Verda stacio	4, 27, 35, 56, 60, 76
Rosseti-vizito	53
Petskribo al UNO	62

Kroniko enlanda	4, 11, 20, 26, 35, 44, 51, 62, 75
Ni legis	6, 12, 21, 35, 45, 60
Sciigoj	7, 23, 31, 38, 56, 71
Korespondi deziras	8, 16, 40, 56, 71, 80
Ricevitaj libroj	12, 39, 54, 79
Ĉeské listy o esperantu (Ĉeĥaj gazetoj pri Esperanto)	16, 48, 56, 72

Esperantista vivo: Bálková 71, Brunclík 55, Dejmek 63, Dittrich 8, Dubný 32, Dvořáček 48, Geryk 32, Hanuš 32, Hladík 24, Hošek 71, Chrostek 32, Izák 55, Jakubcová 40, Jukl 32, 50, Kavan 80, Koutek 24, Lorenz 55, Mikloš 24, Mothejzík 48, Mrázek 8, Novotný 71, Otruba 63, Pech 11, Pravenec 8, Řezáč 48, Scheiber 8, Simon 55, Šafránek 8, Šidlo 63, Šupichová 11, Tomášková 8, Vaněk 40, Veselý 55.
--

Lokaj informoj: Aš 46, Bojkovice 46, Bohumín 28, Boleradice 28, Boskovice 28, 77, Bratislava 14, Brno 14, 28, 46, 77, Brno-Židenice 14, 28, 46, 78, Břeclav 28, 46, 77, Bytča 14, Česká Lípa 28, 78, Česká Skalice 78, Děčín 28, Dobruška 28, 78, Duchcov 46, Doksy 14, 46, 78, Gottwaldov 29, 46, Háj u O. 78, Hradec Králové 14, 28, 78, Hradec u Op. 46, Cheb 14, 29, 46, 78, Chlumec n. C. 46, Chomutov 14, 29, Chotějovice 14, Chrastava 14, 29, Jablonec n. N. 46, Jáchymov 29, 46, Jihlava 14, 29, Josefov 29, 46, Karlovy Vary 14, 29, 46, 78, Kladno 14, 29, Kolín 29, 46, Kopřivnice 29, Košice 46, 78, Kraslice 29, Kyšperk 29, 78, Lanškroun 14, Liberec 29, 78, Lichnov u Fr. 78, Litoměřice 14, Liptovský Hrádek 30, Mariánské Lázně 30, 46, Mimoň 46, 78, Mladá Boleslav 30, 46, Moravany 30, Nejdek 46, 78, Nové Zámky 47, Nový Bor 47, 78, Nový Bydžov 30, 47, Nymburk 30, Olomouc 14, 30, 47, 78, Opava 15, 30, 47, 78, Ostrava 15, 30, 47, 78, Pardubice 15, 30, 47, 78, Plzeň 15, 30, 47, 78, Podmokly 15, 30, Praha 31, 47, 79, Prešov 79, Příbor 31, 47, Rokycany 47, Roudnice 15, Rychnov n. Kn. 79, Sezimovo Ústí 31, Slezská Ostrava 15, Svit 15, 47, Šluknov 15, Tábor 31, 79, Tanvald 15, 79, Teplice 15, Trenčín 79, Trutnov 15, 47, Turnov 47, Třebíč 15, 31, Turčianske Teplice 15, Turč. Sv. Martin 15, Turnov 31, Týniště n. Or. 79, Úpice 79, Ústí n. L. 15, 79, Velké Pavlovice 31, Veselí n. M. 31, 47, Vitkov u O. 15, 31, Vsetín 15, 79, Žlutice 47.
---

## BILDOJ

Aŭstria Esp.-poŝtmarko	48, Jukl 50, Malík 38, Rebiček 11
------------------------	-----------------------------------

## ALDONOJ

VII-a Ĉs. kongreso esperantista (Invito, Raporto pri 1948)
VII-a Ĉs. kongreso esperantista (Raporto pri agado)
Financa raporto de EAĈSR pri 1948
La urbo sub la signo de fajro (prospekto)